

Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto
131
vintro 2022-2023



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

nia federacio sur Facebook

[http://www.facebook.com/
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

prezidanto

Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

aliĝkoto (kun la gazeto)

6 €

> per ĉeko al: "Espéranto-Provence"
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto N. Lafitte
(ĉe la supra adreso de Pierre Oliva)
>aŭ per bankĝiro
(petu la bankinformojn ĉe la sekretario)

sekretario

redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain
48 avenue Alexis Godillot
83400 Hyères
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°
25-a de marto 2023**

bonvolu sendi al la supra retadreso

><<>

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

Vorto de la prezidanto

Ankaŭ ĉi-jare miaj enkondukaj vortoj ne estas tre gajaj!
Mi bedaŭrinde konstatas, ke la aĉa viruso, kiu de tro longa tempo
ĝenas nin, denove pli kaj pli aktivis. Sekve, ne eblas havi plenan fidon
pri la estonteco. Sed danke al la dinamismo de Renée, Pascal kaj
Thierry, eblis sukcesigi organizadon de nia Kultura Semajnfino: staĝo
okazos en La Garde, proksime de Tulono, komence de februaro.
Gratulojn al ili!



Du Esperanto-klubo, tiuj de Gap kaj Manosque, ĉesigis siajn aktiv-
aĵojn pro manko de homaj fortoj por povi plu vivteni ilin.

Mi pensas, ke restas nur tri kluboj, kiuj proponas regulajn kursojn
ĉiusemajne: tiuj de Marseille, Le Beausset kaj Fréjus - Saint-Raphaël.
Plu okazas renkontiĝoj en La Ciotat, Hyères, kaj ekde la pasinta sep-
tembro en Lorgues.

Antaŭdankojn al ĉiuj el vi, kiuj duobligos siajn klopodojn, por ke nia
lingvo restu ĉiam vivoplena.

Bonan jaron 2023 al vi ĉiuj!

Pierre Oliva

enhavo

2	> jarraportoj 2022	7	> vojaĝemaj Provencanoj
5	> Kultura Semajnfino en La Garde > el la provencaj asocioj	8	> el la leterkesto de la legantaro > agendo
		+	> reta suplemento artikolo de Var-Matin pri J-F Cousineau

Ne forgesu pagi la aliĝotizon por la jaro 2023 - 6 € - al Espéranto-Provence

ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasisto, Nicole Lafitte
(aliĝilo aldonita al ĉi tiu gazeto)

Dankon!

N'oubliez pas de payer la cotisation pour 2023 - 6 € - à Espéranto-Provence

soit par l'intermédiaire de votre groupe local, soit directement à notre trésorière, Nicole Lafitte
(bulletin d'adhésion joint à ce journal)

Merci !

**Attention : ce rappel ne concerne pas les adhérents d'Espéranto-Marseille
qui paient la cotisation inter-associative (Espéranto-France + groupe local)**

Federacia agado

Federacia membro-kunveno / Assemblée générale de la fédération

dimanĉon la 26-an de februaro 2023 - je la 14-a

Les Issambres (Var) - Résidence Val d'Esquière

kadre de la Mediteranea Esperanto-Semajno

Bonvolu legi la sekvajn moralan, agadan kaj finanĉan raportojn por la jaro 2022.

La kunvokilon kaj voĉdonan rajtigilon (en okazo de via neĉeesto) vi ricevos en februaro.

Vous recevrez en février la convocation et le pouvoir (pour le cas où vous ne seriez pas présent).

1 - Morala raporto

Pierre Oliva

En mia antaŭa jarraporto, mi skribis ke ni devus forgesi la jaron 2021. Bedaŭrinde tute same estas en 2022. Preskaŭ nenio okazis en la Provenca Esperanto-familio. Pro la viruso estis nuligitaj ambaŭ kutimaj staĝoj, en Les Issambres kaj Le Beausset. Ni perdis du klubojn, en Gap kaj Manosque, pro maljuneco de la membraro kaj neebleco trovi novajn pli junajn fortojn por daŭrigi la aktivaĵojn en tiuj du urboj, ve!

Ĉu pli gajos la estonteco en 2023?

Mi scias, ke la Mediteranea Esperanto-Semajno okazos en Les Issambres. Dankegon al la skipo kiu, malgraŭ la plu promenanta viruso, sukcesigos ĝin.

Ni ne plu povis disponi en novembro pri nia kutima staĝejo en Le Beausset, sed dank' al la dinamismo de tri membroj de la federacia komitato, Renée, Pascal

kaj Thierry, nia Kultura semajnfino okazos ĉi-jare en La Garde, tre proksime de Tulono, en la restadejo «Massacan». Gratulojn kaj dankojn al ili!

Post la endormiĝo de la kluboj en Gap kaj Manosque, mi bone komprenis, krom eraro, ke restas nur tri kluboj, kiuj proponas regulajn semajnajn kursojn, en Marsejlo, Le Beausset kaj Fréjus - Saint-Raphaël.

Okazas Eo-eventoj ankaŭ en La Ciotat, Hyères, Lorgues kaj Avignon. Renée Triolle kontaktis la du liceojn de La Ciotat. Bedaŭrinde ŝi ankoraŭ ne sukcesis akiri la konsentojn de la liceestroj... egan paciencon ŝi bezonas!

Mi esperas, ke la diversaj virusoj ne malebligos al ni atingi niajn celojn dum 2023. Mi forte kredas je nia sukceso!

2 - Agadraporto

Pascal Vilain

1 - Membraro

Je la 31-a de decembro 2022, Espéranto-Provence havis 91 membrojn (- 6).

2 – Asocioj, grupoj kaj individuaj membroj

2-1 deklarataj asocioj

- kiuj plu ekzistas kaj aktivas

13 - Marseille: 14 federaciaj membroj

ttt-ejo : <http://esperanto.marseille.over-blog.com>

83 - Saint-Raphaël: Espéranto-Club Fréjus/Saint-Raphaël: 18 federaciaj membroj

83 - Le Beausset: Espéranto – Le Beausset: 6 federaciaj membroj

84 - Avignon: K.E.C.A. (Kultura Esperanto-Centro de Avinjono): 4 federaciaj membroj

- **kiuj plu ekzistas administracie sed ne aktivas**

04 - Manosque: E.K.E.M. (Esperanta Kulturo en Manosque): 5 federaciaj membroj

05 - Gap: Espéranto-Gap: 3 federaciaj membroj

13 - La Roque-d'Anthéron: Espéranto-La Roque

13 - Miramas: G.E.M. (Groupe Espéranto Miramas)

2-2 antenaj grupoj de Espéranto-Provence

13 - La Ciotat (2 federaciaj membroj)

83 - Hyères (8 federaciaj membroj)

3 – Administro

estraranoj (3)

prezidanto: Pierre Oliva

sekretario: Pascal Vilain

kasisto: Nicole Lafitte

aliaj komitatanoj (6)

Monique Arnaud, Marc Gallardo, Josiane Moirand, Thierry Spanjaard, Renée Triolle, Gilles Wallez

gazetrespondeculo: Pascal Vilain

retejrespondeculoj: Thierry Spanjaard, Pascal Vilain

reprezentanto de nia federacio ĉe Espéranto-France: Thierry Spanjaard

membrokunveno > februaro 27 - Les Issambres

komitatkunsido > junio 23 - La Ciotat (ĉe Renée Triolle)

4 – Instruado

> **kursoj:** en la kluboj de Saint-Raphaël, Le Beausset, La Ciotat, Marseille, Avignon,

> **staĝoj**

novembra staĝo en Le Beausset : nuligita (ĝi okazos en La Garde en februaro 2023

Mediterranea Esperanto-Semajno en Les Issambres > februaro 26 / marto 5

5 – Informado – komunikado

> disdonado de Le Monde de l'espéranto (Renée Triolle en La Ciotat kaj Marseille, Rosy Inaudi en sia regiono, Pascal Vilain en Hyères)

> **Lingvaj kafejoj**

- en Marseille "Les Danaïdes", 4 square Stalingrad, 1-a distrikto, la 1-an jaŭdon de ĉiu monato.

- en Hyères, Hotelo Ibis-Gare, la lastan merkredon de ĉiu monato.

- en Lorgues, "Carnets de Voyage" 12 av. Allongue, la lastan jaŭdon de ĉiu monato, ekde septembro

> **Forumoj de asocioj** en septembro

Embrun (05), La Ciotat (13), Marseille (13), Le Beausset (83), Saint-Raphaël (83), Avignon (84), Caromb (84)

> la 6-an de novembro, plenpaĝa artikolo en Var-Matin: «Jean-François Cousineau : la foi dans l'espéranto».

6 - klubaj eventoj

> februaro 2 - Saint-Raphaël: reĝkuka festo + membro-kunveno

> junio 26 - Les Issambres: komuna manĝo en Val d'Esquière proponita de la klubo Fréjus-Saint-Raphaël

> septembro 11 - Les Arcs-sur-Argens: pikniko de la klubo Fréjus-Saint-Raphaël

7 – movadaj eventoj

> marto 19: Printempa reta festo de Espéranto-France ; partoprenis P. Vilain pri EsKu kaj kvizo pri Lidja Zamenhof.

> majo 26-29 - Trélissac (24): Kongreso de Espéranto-France ; partoprenis pluraj Provencanoj.

En la komitatkunsido, R. Triolle anstataŭis T. Spanjaard kiel reprezentanton de nia federacio.

> julio - Sainte-Enimie (48): N. Lafitte kaj P. Oliva partoprenis en la Ĝenerala Membro-kunveno de la asocio «Espéranto-Info».

> julio 2-8 - Kastelo Greziljono: 2-a «Festivalo Naturist' por nova mondo» kaj 3-a Verda Naturisma Semajno, organizita de La Kulturdomo kaj INOE - partoprenis pluraj membroj de Espéranto-Provence - T. Spanjaard prelegis pri la Eŭropaj organizoj.

> aŭgusto 6-13 - Montrealo (Kanado): 107-a Univerŝala Kongreso ; partoprenis 5 Provencanoj

T. Spanjaard partoprenis en la Movada Foiro kiel prezidanto de INOE.

Okaze de la Belartaj Konkursoj, P. Vilain havis la trian premion en la kategorio «Mikronovelo».

> somere - Aŭvernjo: M. kaj P. Prezioso renkontis lokajn esperantistojn.

> oktobro 16 - Parizo: kunveno de FEI - partoprenis R. Triolle

> dum la tuta jaro, artikoloj de Provencanoj en diversaj Esperanto-revuoj.

> dum la tuta jaro: N. Lafitte kaj P. Vilain partoprenis en verkateliere iniciatita de A. Löwenstein

> dum la tuta jaro: J-F. Cousineau korektis la revuon «Espéranto-Info»; P. Vilain korektis «Le Monde de l'espéranto».

8 – kulturaj kaj alispecaj eventoj

- > junio 4 - Rejkjaviko (Islando): J-F Cousineau renkontis Jón Eliasson, eminentan tiean esperantiston.
- > septembro 23 - La Ciotat: prelego de R. Triolle pri la franca versio de la verko «La danĝera lingvo».
- > septembro 24-25 - La Ciotat: 1-a Salono pri Libro kaj Artoj ; partopreno de R. Triolle kaj aliaj esperantistoj.
- > oktobro 8 - La Ciotat: Navig'Arts, kultura kaj arta evento ; partoprenis R. Triolle.
- > novembro 4-6 – Beogrado (Serbio): Internacia naturista naĝkonkurso. Partoprenis pluraj INOE-Provencanoj.
- > novembro 9-24 - Parizo: Ĝenerala Konferenco de UNESKO - nome de UEA partoprenis R. Triolle
- > decembro 11 - La Ciotat: Salono de la urbaj verkistoj ; partoprenis R. Triolle

> decembro 17 - Marseille: prelego de R. Triolle pri la franca versio de la verko «La danĝera lingvo».

9 – diversajtoj

- > Marseille: ĉiuj malaperintaj stratplatoj «Rue du Docteur Zamenhof» estis ree instalitaj, danke al aktiva zorgado de T. Spanjaard.
- > julio ĝis septembro: A. Rémy biciklis tra Eŭropo kaj renkontis esperantistojn.

10 – venontaj okazaĵoj

- > februaro 4-5 - La Garde (83) > Kultura Semajnfino
- > februaro 25 - marto 4 - Les Issambres: Mediteranea Esperanto-Semajno 2023

3 - Financa raporto

Nicole Lafitte

Pro la plua viruso, la bilanco restas malpeza; ni ja havas malmulte da agadoj.

Ni perdis du klubojn en Gap kaj Manosque, do enspezis malpli da kotizoj.

La klubo de Gap petis, ke nia federacio zorgu pri la restanta sumo de 96,34 €, anstataŭ ĝi!

Tiu de Manosque, post la donaco de 337,06 €, simple petis de ni, ke ni memoru pri tiu donaco okaze de eventuala kreo de nova klubo en Manosque.

La bilanco aperigas sumon de 700 € kiel antaŭpagon por la staĝo 2023 en La Garde. Sekve, sen tiuj 700 eŭroj, ni havus pozitivan rezulton. Kaj mi memorigas al vi, ke la saldo de nia ŝparkonto ne ŝanĝiĝas jam de du jaroj.

bilan financier 2022			
recettes		dépenses	
cotisations	504,00	gazette (impression et envoi)	519,40
dons	393,00	La Poste	13,92
intérêts sur 1 part sociale	0,70	règlement facture Génépi/Gap	20,00
suite fermeture club de Gap	96,34	site Espéranto-Provence	31,18
dont nous gérons le compte		frais annulation stage Le Beausset	192,02
suite fermeture club de Manosque	337,06	acompte stage La Garde (02-2023)	700,00
total des recettes	1 331,10	total des dépenses	1 476,52
déficit sur année 2022	145,42		
total	1 476,52	total	1 476,52
solde au 31/12/2022 > compte courant : 1 373,95 €; livret épargne : 4 622,21 €			
la trésorière : Nicole Lafitte ; le président : Pierre Oliva			

Kultura Semajfino en La Garde, la 4-an kaj 5-an de februaro

Ĉu vi partoprenos en nia februara staĝo en La Garde? Espereble jes! Vi tiam ĝuos la ĉeeston de du esceptaj kursgvidantoj, **Katalin Kovats** kaj **Sylvain Lelarge**, kiuj speciale por vi venos el Nederlando.

Se vi jam sendis vian aliĝilon, dankegon! Se vi ankoraŭ ne sendis ĝin, tuj tion faru, tio helpos la organizantojn. Se vi ne retrovas la aliĝilon, kiu estis rete sendita al vi la 20-an de novembro, bonvolu peti ĝin denove de nia sekretario (telefonnumero ka retadreso en la kolo-fono, unuapaĝe).



kelkaj bildoj pri la restadejo "Domaine de Massacan", kiu gastigos la staĝantojn.



Katalin Kováts, antaŭe konata kiel Katalin Smidéliusz, estas hungardevena esperantistino, metodologo, pedagogo, lingvisto, esperantologo, matematikisto kaj vitartisto. Ŝi gvidas multajn Esperanto-kursojn kaj metodikajn seminariojn dise en la mondo kaj okupiĝas pri la redaktado de la porinstruista ttt-ejo www.edukado.net, kiun ŝi fondis en 2001.

Ŝi loĝas en Nederlando kun sia edzo, Sylvain Lelarge.

Spektu ĉi tie la ĵus aperintan filmeton pri ŝi en la videokanalo EsKu.

Sylvain Lelarge profesie instruas la francan lingvon al Nederlandanoj, aperigas prilingvajn kaj kulturajn artikolojn en nederlandaj revuoj por francamantoj. Li havas propran lingvoinstituton, regule gvidas kursojn pri la franca lingvo en Nederlando kaj en Francio kaj kreas multajn lernmaterialojn. Li esperantigis por edukado.net kvindekono el ili, kiujn vi povas trovi en la sekcio "Instrumaterialoj" de la TTT-ejo.



El la provencaj asocioj



13 - Espéranto-La Ciotat

Renée Triolle

Kulturaj aranĝoj kaj Esperanto

La 8-an de oktobro okazis en La Ciotat tuttagaj kulturaj aranĝoj «**Navig'Arts**», sur diversaj placoj.

Mi estis invitita kiel "verkisto" kaj proponis budon pli ĝenerale pri Esperanto, ne nur pri miaj lernolibroj aŭ tradukoj.

La pluvo malkuraĝigis la homojn sed la preterpasantoj montris grandan intereson, longe inteligente diskutis.

Mi rikoltis pli da adresoj ol dum la Forumo de Asocioj kaj retrovis lerninton de Michel Duc-Goninaz, de la epoko, kiam Esperanto estis unu el la fakoj por «Unités de valeur» ĉe la universitato de Aix-en-Provence.

Reporté pour cause de pluie, le **Salon des Écrivains ciotadens** s'est tenu à La Ciotat par une température avoisinant les 0° dans la cour de l'Eden, le plus vieux cinéma du monde, le 11 décembre.

Mon but n'était pas de vendre des livres, mais de faire connaître la langue équitable au public. Et ce fut le cas. Oui, l'espéranto a une littérature originale ; oui, il y a de la poésie en espéranto; oui, l'espéranto s'apprend plus vite qu'une autre langue et sert de tremplin à l'étude d'autres langues ; oui, l'espéranto est parlé dans le monde entier, à tous les âges, quelle que soit la profession du locuteur.

La bande dessinée "Ĉiuj superherooj", traduite du français par Michèle Abada-Simon, a permis de comparer la démarche de Lilian Thuram qui face au communautarisme aujourd'hui, propose un match de foot alors que le jeune Zamenhof au XIXème siècle, construit une langue.




La veille, j'avais pu intervenir lors d'une conférence-débat sur la pédagogie Freinet.

Rappelons que "Les dits de Mathieu" ont été traduits par GEE, les enseignants français d'espéranto, et que l'espéranto est souvent le truc que les enseignants du primaire utilisent (correspondance internationale, chants).

Espéranto - langue dangereuse !

Même si le titre peut surprendre, c'est celui du livre de l'historien allemand **Ulrich Lins** sur les persécutions subies par les espérantistes sous les dictatures, surtout celles de Hitler et Staline.



Renée Triolle, qui a participé à la traduction en français du livre paru chez L'Harmattan en 2022, était l'invitée, samedi 17 décembre, du CIRA, le Centre international de recherches sur l'anarchisme de Marseille.



83 - Esperanto-Klubo Fréjus - Saint-Raphaël

Monique Prezioso

Dimanche 18 décembre, une vingtaine de «samideanoj» se sont retrouvés à Saint-Raphaël pour fêter le «Zamenhof-tago».

Après le rassemblement de quelques membres sous une plaque de la rue Zamenhof, pour la traditionnelle

Dès la parution de l'espéranto (1887), plutôt dès que son utilisation se répand au début du XXème siècle, l'espéranto se voit reprocher d'être ce pour quoi il a été construit : langue facile (les élèves perdront le goût de la difficulté), concurrente du latin, ouverte à tous et pas seulement à une certaine élite, reconnaissant les langues minoritaires. Quel que soit le dictateur, Hitler qui envoie les espérantistes dans les camps, Staline au goulag mais aussi Salazar, Franco, plus près de nous Saddam Hussein, le processus est toujours le même : interdiction d'enseigner l'espéranto (on ne prête pas de salles), interdiction d'informer, blocage des fonds (donc impossibilité de s'abonner à des revues, de commander des livres), etc. On suspecte les espérantistes, qui communiquent dans le monde entier avec une langue qui paraît secrète, d'être des ennemis de l'État : en novembre dernier deux jeunes Congolais qui, après le cours, pratiquaient la langue dans la rue, ont été arrêtés, incarcérés parce que les policiers ne comprenaient pas ce qu'ils disaient !

photo, nous nous sommes rendus au Restaurant «François 1er» géré par Laura, qui a appris l'espéranto avec Carmen Segarra, il y a 20 ans.

Jean-Claude Roget y fit un discours en espéranto, où il rappela la nécessité de parler en anglais (!), selon les

recommandations ou constatations de notre Président !

Après un très bon repas et de joyeuses discussions, Christine Grayssaguel nous a fait jouer à des devinettes en espéranto.



Ce fut une très bonne journée de retrouvailles, en attendant le partage de la galette des rois en janvier, le week-end culturel à La Garde les 4 et 5 février et le stage «M.E.S.» du 25 février au 4 mars.



Renée Triolle

Nous avons quitté le restaurant avant que ne débute la finale de la Coupe du monde de football. Un amical salut à la FIFA qui a fait apparaître l'espéranto sur le ballon officiel de la Coupe avec la mention «**Futbalo estas**», encadrée par les caractéristiques du football : esprit d'équipe, honnêteté, etc. On peut se procurer ce ballon au prix de 150 € sur le site d'Adidas. (Ballon Al Rihla Pro)



Sur ses el la triangulaj pecoj de la pilko aperas la mesaĝo: **FUTBALO ESTAS – KOLEKTIVA – RESPONDECO – PASIO – RESPEKTO – TEAMLABORO – HONESTECO**



83 - Espéranto-Lorgues

La regiona ĵurnalo Var-Matin «Draguignan-Brignoles» de la dimanĉo 6-a de novembro 2022 dediĉis tutan paĝon al portreto de **Jean-François Cousineau**.

Kopio de la paĝo estas aldonita kiel gazeta suplemento, nur por la reta versio.

Ĝi estas legebla ankaŭ **ĉi tie, sur nia retejo "Espéranto-Provence"**.



Vojaĝemaj Provencanoj

Thierry Spanjaard

INF-FNI (Internacia Naturista Federacio) organizis la 50-an internacian naturistan naĝkonkurson de la 4-a ĝis la 6-a de novembro en Beograd, Serbio.

INOE, Internacia Naturista Organizo Esperantista, partoprenis en la evento samnivele kiel grandaj nacioj: Francio, Hispanio, Svislando, ktp!

Partoprenis 3 Provencanoj - kaj INOE-membroj - **Rosy Inaudi, Marc Gallardo kaj Thierry Spanjaard**, kiuj gajnis tri medalojn: unu oran kaj du bronzaĵn.





El la leterkesto de la legataro

Philippe Chavignon

Dankon kaj gratulojn pro tiu bunta bulteno!
Oni povus imagi pli entuziasmigajn enkondukajn vortojn de la redaktoro.

Aŭ ĉu estas ruza tekniko - jam uzita de Gurdjief en "Récits de Belzebuth à son petit-fils" - kiu konsistas en malinstigo al legado por fakte per tiu strangaĵo instigegi al legado?

Se esperantistoj jam komencas uzi tiajn teknikojn, "alvenis la horo de la sukceso de Esperanto"* , kiel diris Fidel Kastro ĉe la prezidenta palaco okaze de la UK en 1990, salutante paron svedan/japanan, kies filino aspektis japana tamen kun bluaj okuloj!

* "Cuando los japoneses tienen los ojos azules es que llevo la hora del esperanto."

resp. de la redaktoro

Ho, komento pri la antaŭa gazeto! De longe tio ne okazis... kaj tio ege plaĉas al mi, Philippe! Dankon!

Ĉu mia enkonduka teksteto vere malinstigis al legado de la gazeto? Espereble ne, tion mi ne celis. Male! Ankaŭ ion mi ne celas nek volas: enŝovi strute mian kapon en la sablon, kaj tiel ne konstati la realan situacion de nia movado en Provenco!

Sed mi tamen pretus uzi iun ajn ruzan teknikon, eĉ tiun jam uzitan de Gurdjief, se tio povus helpi en la sukceso de nia lingvo.

Gramatiko pri la uzo de akuzativo?

Jes, mi legis viajn kontribuojn en Fejsbuko.



À noter sur votre agenda

dans notre fédération

février 4 & 5 - La Garde (83)

Week-end culturel
bulletin d'adhésion joint à cette gazette

février 25 / mars 4 - Les Issambres (83)

MES - Semaine espérantiste méditerranéenne
infos : Monique 04 94 83 06 88
ou Christine 04 89 99 87 48

février 26 - Les Issambres (83)

Assemblée générale de la Fédération Espéranto-Provence
(convocation et pouvoir envoyés en février)

1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille (13)

Café linguistique espéranto
Brasserie Les Danaïdes
4 square Stalingrad, Marseille 1
infos : Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51

dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères (83)

Café linguistique espéranto
bar de l'hôtel Ibis-Gare
45 rue Edith Cavell (face à la gare)
infos : Pascal Vilain - 06 42 19 68 51

dernier jeudi de chaque mois - 17 h - Lorgues (83)

Café linguistique espéranto
bar-resto « Carnets de Voyage » 12 avenue Allongue
(rue qui descend en face de la mairie)
infos : Jean-François Cousineau
04 94 47 99 45 / 06 82 53 52 02 (laissez un message)

en France

février 25 / mars 4 - La Bastide-sur-l'Hers (09)

30ème stage de chant choral en espéranto
infos : tutpeko(chez)aliceadsl.fr

mai 5-9 - Lyon (69)

Congrès interassociatif de l'espéranto en France.
<https://esperantolyon.wordpress.com/>

Baugé (49) - Château de Grésillon

riche programme PRINTEMPaS
<http://gresillon.org/?lang=fr>

en Europe


2023 - juillet 29 / août 5 - Turin (Italie)

108ème Congrès universel d'espéranto
<https://www.esperanto.it/torino2023/>

Terres du Var LE PORTRAIT DU DIMANCHE

Jean-François Cousineau : la foi dans l'espéranto

Installé à **Lorgues** depuis peu, J.-F. Cousineau est passionné par les langues. Plus que de défendre le langage universel qu'est l'espéranto, il milite pour un mode de pensée humaniste.



(Photos Luc Boutrix)

Le moins que l'on puisse dire, c'est que lorsqu'on parle d'espéranto avec Jean-François Cousineau, il n'avale pas sa langue. C'est même plutôt la langue qui l'a avalé... À 64 ans, ce globe-trotter Lorguais, retraité d'un service départemental de protection de l'enfance, en est l'un des fervents défenseurs. L'espéranto est un langage international universel fondé en 1887 par un docteur polonais. Ceci autour du principe philosophique suivant : « Unir les hommes progressivement, sans les couper de leurs racines, en une seule humanité basée sur des principes de "neutralité" linguistique, morale et religieuse, et dans un esprit de justice, d'égalité et de fraternités mutuelles. » Vaste programme.

« Une haute idée de la communication »

« Aujourd'hui, on estime que deux millions de personnes l'utilisent dans près de 130 pays, détaille le Lorguais. L'espéranto, c'est une autre idée de la communication, c'est même une haute idée de la communication. » Mais plus encore, pour le passionné, c'est « une langue équitable, accessible à tout le monde par sa simplicité. » Depuis toujours, l'homme aime les langues, « pour leur dimension culturelle, parce qu'elles permettent de s'imprégner d'autres modes de vie. » Comprendre que les

langues sont des portes d'entrée pour appréhender le système de pensée de l'autre. Quand à 26 ans, il tombe sur une méthode d'apprentissage d'espéranto, il n'en a alors jamais entendu parler, mais ça l'intrigue. « J'ai trouvé le système génial. Il suffit d'apprendre une racine, et on est capable de fabriquer une cinquantaine de mots, sans avoir à les apprendre. » De fil en aiguille, il assiste à son premier congrès mondial à Valence en 1993. Et face à des milliers de personnes en provenance du monde entier, face à la même passion et au même idéal, il a le déclic et se lance.

« L'espéranto est formé à peu près 60 % de racines gréco-latines, de 35 % de racines anglo-saxonnes, et de 5 % de racines slaves, poursuit-il. Lorsqu'on utilise une langue, le sens des mots peut être compris différemment en fonction de sa culture propre. Par exemple, au Pérou, si vous dites : "Votre repas n'était pas mauvais". Ce sera très mal perçu. En espéranto, ce problème n'existe pas. Les mots ont un sens très précis pour faciliter une compréhension commune. » Mais au-delà de tout cela, l'espéranto, c'est aussi un idéal. « Guy Béart disait : "l'anglais, c'est la langue du pognon. L'espéranto, celle de l'amour". Parce que

« Avec une langue hégémonique, on uniformise la pensée »

lorsqu'une langue devient hégémonique – comme l'anglais, actuellement –, elle a tendance à faire disparaître les langues minoritaires. On va donc vers une uniformisation de la pensée. D'autant qu'un rapport dominant/dominé s'instaure entre ceux qui maîtrisent ou non cette langue dominante. » A contrario, avec l'espéranto, l'idée est de partir du principe qu'il n'y a pas de frontières, mais une seule et même humanité. « D'où la création d'une langue commune pour communiquer et se comprendre. Tout en conservant les langues de chacun en tant qu'identité culturelle. »

Car pour le Lorguais, nous vivons dans une société trop individualiste. « Nous sommes trop centrés sur nous-même, en tentant d'imposer un modèle européen et une vision des choses que tout le monde doit suivre. Pour moi, c'est une aberration. On a besoin de mieux connaître l'autre. Pour cela, il faut accéder à sa culture. Et l'espéranto le permet, sans intérêt hégémonique. »

MATTHIEU BESCOND
mbescond@nicematin.fr

« Traduire, pour repousser les limites de la langue »

« Astérix, ce n'est pas (qu') un livre pour enfants. Comment faire alors pour retranscrire l'esprit de Goscinny ? » C'est la question que Jean-François s'est posée, au moment de traduire une de ces aventures pour un éditeur Croate. « J'ai toujours voulu aller aux limites de la langue espéranto. J'avais lu une traduction d'Astérix qui m'avait déçue. De fil en aiguille, j'ai rencontré cet éditeur, et je me suis donc attaqué aux allusions et jeux de mots de Goscinny, avec un ami. »

Les choses ne sont pas simples, mais ils y parviennent. « On a buté parfois sur des points grammaticaux. On ne pouvait pas tout traduire de la même manière, la langue ne le permettait pas. Mais on a trouvé l'équivalent pour respecter l'esprit de l'auteur. » Bilan des courses : objectif atteint. « Je me suis rendu compte qu'on pouvait pousser très loin les limites de l'espéranto.

Particulièrement au niveau de l'expression d'idées. C'était une très bonne expérience. » Une expérience qu'il a aussi tentée dans la traduction de chansons pour différents groupes, aussi bien dans les domaines du punk que du rap. « J'ai traduit des choses plutôt "trash". Et là aussi, ça marche très bien ! » sourit-il. L'espéranto, c'est tout ça et plus encore. Mais comme pour toute langue, l'espéranto, il faut le parler. Peu après son arrivée à Lorgues, Jean-François s'aperçoit qu'il y a une demande en la matière de la part de débutants. Alors il organise depuis peu des rencontres ouvertes à tous, pour échanger autour d'un « café espéranto » à Lorgues (1). Le premier a eu lieu il y a un mois. D'autres devraient suivre de manière mensuelle. À bon entendre.

1. Contact : jeff83@orange83.fr - 04 94 47 99 45.

